

RETKOMUNIKOJ 2011/2

ĈEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonajn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

1. ŜANĜO DE LA ĈEFDELEGITO de UEA por ĈEĤIO
2. KOLEKTANTOJ kaj EKOTURISTOJ RENKONTIĜOS SINSEKVE
3. ESPERANTO-KONGRESO de ĈEA
4. VIKIMANIO = Internacia vikipediista renkontiĝo
5. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS
6. ESPERANTO-KALENDARO
7. ADIAŬO kaj BONVENIGO de la NOVA REDAKTORO

1. ŜANĜO DE LA ĈEFDELEGITO de UEA por ĈEĤIO

12 jarojn plenumis la funkcion de la ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio tre bone Lucie Karešová, tamen ekde ĉi-tiu jaro okazis ŝanĝo kaj la funkcion transprenis mi, la ĝisnuna redaktoro de la ĈEA-retkomunikoj Petro Chrdle, chrdle@kava-pech.cz. Do bv. en la aferoj ligitaj al UEA (individua membreco, abono de periodaĵoj eldonitaj de UEA kaj TEJO, delegita reto, informoj kaj aliĝiloj al universalaj kongresoj, ktp) bonvolu kontakti min. Mi volas ĉi-okaze publike danki (certe ankaŭ nome de la ceteraj individuaj membroj de UEA) al Lucie por perfekta plenumo de la funkcio kaj promesi, ke mi strebos ĝin plenumi same respondece kaj bone kiel faris ĝis nun ŝi.

2. KOLEKTANTOJ kaj EKOTURISTOJ RENKONTIĜOS SINSEKVE

Atentu du sinsekvajn aranĝojn en Prago kaj ĝia najbareco, kiuj bone ebligas partoprenon de ambaŭ:

Ekde la 8-a ĝis la 11-a de septembro okazos en Prago Internacia renkontiĝo de filatelistoj kaj esperantaĵ-kolektantoj organizita de ELF-AREK lige al la renoma tradicia internacia foiro Sbĕratel (kolektanto) en Praga foirejo: <http://www.sberatel.info/cs> Atentu ke dekstre supre estas elekteblo de 10 lingvoj. Ĉi-okaze kaj danke al Miroslav Hruška estis ankaŭ fondita retpaĝaro de ELF-AREK ĉe <http://elf-arek.wz.cz/> . Pli da informoj kaj aliĝilojn vi trovos ĉe www.kava-pech.cz/kolektantoj.

Tuj post ĝi, ekde la 11-a de la 18-a de septembro okazos tradicia renkontiĝo de esperantistoj – ekoturistoj, do piedturistoj kaj biciklantoj. Oni loĝos en la pensiono Sokol bone konataj al esperantistoj, kie okazos ankaŭ la komunaj vesperaj programoj. Sed dum la tagoj ambaŭ grupoj aparte esploras la belegan pejzaĝon de Bohemia Karsto kaj montetaro Brdy. Pli da informoj kaj aliĝiloj mĉe www.kava-pech.cz/ekotur Ene de Ekotur estos prezentata ankaŭ nova kvinlibra Ekoturisma vortaro de internacia aŭtoro kolektivo sub la gvido de Zdenĕk Pluhař: <http://www.kava-pech.cz/book-ekovortaro-czech.html>.

Ambaŭ okazaĵojn kunligos la trajnekskurso la 11-an de septembro al Svitavy kies ĉefa celo estos vizito de la Esperanto-muzeo.

3. ESPERANTO-KONGRESO de ĈEA

Precipe membroj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (tamen estas invitataj ĉiuj esperantistoj kiuj interesiĝas pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio) ne pretervidu, ke de la 7-a ĝis la 9-a de oktobro okazos en distrikta urbo Ŝumperk (Norda Moravio, submontaro de Jeseníky) Kongreso de ĈEA, dum kiu estos inter alie elektitaj novaj skipoj de funkciuloj, kiuj gvidos nian asocion dum la venontaj 3 jaroj. La kandidatojn kolektas kaj pluajn informojn pri la elektoj povas al vi doni gvidanto de la elektokomisiono Petro Chrdle chrdle@kava-pech.cz kaj la membroj de la komisiono Vĕra Podhradská podhradska@volny.cz kaj Marek Blahuš marek@blahus.cz

Dum la kongreso oni diskutos kaj aprobas ankaŭ novajn statuton kaj elektoregularon de ĈEA, do evidente la persona ĉeesto de la membroj estas tre grava. Krom tiu laborprogramo okazos lingvaj kaj fakaj seminarioj, gvidata trarigardo de la urbo kaj riĉa vespera kultura proĥramo. Pli da informoj kaj aliĝiloj ĉe <http://www.esperanto.cz/cs/akce/sjezd-ceskeho-esperantskeho-svazu-379.html> aŭ ĉe tomecek@esperanto.cz

4. VIKIMANIO = Internacia vikipediista renkontiĝo

Vikimano estas unika internacia renkontiĝo de kontribuantoj al esperanta Vikipedio omaĝe al ĝia dekjarigo. Ĝi okazos en Svitavy de la 26-a ĝis la 30-a de oktobro. La partoprenantojn atendas prelegoj, seminarioj, laborgrupoj, instrulecionoj por komencantoj, kultura programo, sed ankaŭ urbotrarigardo kaj ekskurso al ĉarma proksima renesanca urbo Litomyšl troviĝanta en la Unesko-listo de kulturheredaĵoj. Detalajn informojn vi trovos ĉe <http://www.vikimano.estranky.cz/> aŭ skribu al evikimano@gmail.com

5. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS

ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS

(oficiala organo de ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)

Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) travivas someron riĉan je eventoj: Julio ekis per unutaga enlanda renkontiĝo "Kun kuniklo tra tubo" en Kralupy nad Vltavou en ĉeesto de 5 personoj. Du semajnojn poste en Kievo komenciĝis la 67-a IJK, kiun partoprenis 7 ĈEJ-anoj (Barbora ZÁVODSKÁ, Miroslav HRUŠKA, Jaroslav GENNERT, Martin BUREŠ, Karol RYDLO, Stanislav ŠTOČEK, Daniel MRÁZEK), el kiuj kelkaj ankaŭ la postkongreson en Krimeo. En la samtempe en Olomouc okazanta 77-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj reprezentis ĈEJ Marek BLAHUŠ, kiun akompanis francino Salomé HUG. Poste li ĉeestis ankaŭ la 44-an ILEI-konferencon kaj la 96-an UK-n en Kopenhago. Tiujn aranĝojn sekvis la ĵus finiĝinta Somera Esperanto-Studado (SES) en Nitra (Slovakio), kiun el Ĉeĥio vizitis 6 junuloj (inkluzive de novulo Miloš HAVLÍČEK el Třešť) kaj ankaŭ kelkaj pliaĝuloj.

Daniel MRÁZEK ligis kontakton kun la esperanto-klubo en Pardubice kaj fine de junio dum ĝia 17-a Esperanto-Tago prezentis tie pri ĈEJ. Similan prezenton faris Miroslav HRUŠKA en la klubo de Brno la 21-an de majo okaze de ties 110-jariĝa festo. Jam aprile li tie prelegis pri sia vojaĝo al Francio. Sammonate li aranĝis prelegon de Pavel LEHKÝ el la asocio eLingvo en kurso pri "Tutmondiĝo kaj regioniĝo" ĉe la brna Mendel-Universitato. Komence de junio Miroslav HRUŠKA kaj Vít MIŠUREC ĉeestis la muzean nokton en Svitavy. Revuo Týdeník Rozhlas aperigis reagon (en n-ro 19/2011) de Barbora ZÁVODSKÁ al artikolo de psikologo Zbyněk VYBÍRAL kun titolo "Esperanto (ne)vzdělaných?" (en n-ro 11/2011 aŭ ĉe <http://tinyurl.com/eovybiral>).

Miroslav HRUŠKA ekde julio faras 3-monatan staĝon en Partizánske (Slovakio) ĉe la organizo E@I, helpe de la EU-programo ERASMUS (kun kunstaĝantoj el Francio kaj Hispanio), simile kiel antaŭe en Francio Marek BLAHUŠ. Tiu intertempe magistriĝis pri informadiko kaj ekde oktobro staĝos dum 5 monatoj ĉe la Ĝenerala direktorejo por interpretado de la Eŭropa Komisiono en Bruselo. En junio li renkontis esperantistojn en Pollando kaj Slovakio, kaj la 10-an de julio aranĝis kunvenon de tri

eksterlandaj esperantistoj kiuj tiam sekvis en Ĉeĥio kursojn de la ĉeĥa lingvo (Salomé HUG el Francio, Geir LANGÅRD el Norvegio, Robert BUDZUL el Aŭstralio). Komence de aŭgusto li helpe de stipendio kiel unu el kelkaj esperantistoj ĉeestis la tutmondan vikipedian renkontiĝon Wikimania en Hajfo (Israelo) kaj renkontis ankaŭ lokajn esperantistojn. Retpaĝaro de ĈEJ troviĝas ĉe <http://cej.esperanto.cz/>

6. ESPERANTO –KALENDARO de Esperanto eventoj en Ĉeĥio aŭ organizitaj el Ĉeĥio:

2011-08-12/14: Renkontiĝo de iamaj partoprenintoj de Someraj Esperanto-Tendaroj en Lančov. Info: malovec@volny.cz

2011-09-08/11: Internacia renkontiĝo de ELF-AREK (Esperantistoj-filatelistoj kaj esperantaĵkolektantoj) en Prago: Info: www.kava-pech.cz/kolektantoj aŭ chrdle@kava-pech.cz

2011-09-09/11: Konferenco de la Katolika sekcio de ĈEA en paroĥa centro en Žirovnice. Info: Max Kašparů, Max.esperanto@gmail.com

2011-09-10: Postferia renkontiĝo en Putim laŭ la spuroj de Ŝvejk. Turisma aranĝo kun lingve eduka programo. Info: pisek@esperanto.cz

2011-09-11/18: EKOTUR 11. Tradicia ekoturisma renkontiĝo por biciklantoj kaj piedturistoj en Dobřichovice (itinerroj en Bohemia Karsto kaj montetaro Brdy). Info: www.kava-pech.cz/ekotur aŭ chrdle@kava-pech.cz

2011-09/30-10/02: Jarkonferenco de ĈeFEA (Ĉeĥa Fervojista Esperanto-Asocio) en Rakovník. Info: www.ifef.wz.cz aŭ Jindřich Tomíšek, tomisek.ck@seznam.cz

2011-10-07/09: Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Šumperk Info: Tomecek@esperanto.cz, www.esperanto.cz

2011-10-10/16 Lingva seminario en la pensiono Espero en Skokovy. Ĝin organizas Asocio de Esperantistoj Handikapuloj, sed ĝi estas malfermita al ĉiuj esperantistoj (eĉ komencantoj) kiuj volas levi sian lingvan konon. Info: drahotova@esperanto.cz

2011-10-15: Desegnado kun Pavel Rak (por infanoj) kaj Tra Japanio per Esperanto (kun Petro Chrdle) en Muzeo de Esperanto en Svitavy. Info: Libuše Dvořáková, dvor.libuse@seznam.cz

2011-10-26/30: VIKIMANIO - internacia renkontiĝo de kontribuantoj al Esperanta versio de Vikipedio en Svitavy. Info: www.vikimanio.estranky.cz/ aŭ ĉe evikimanio@gmail.com

2011-12-10: AnkRo - Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek. Info: pisek@esperanto.cz

2012-07-10/15: La 18-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso en Opava kun la ĉeftemo „Depresio kiel kromefiko de kronikaj malsanoj“. Info: Eva.Kopecna@ivax-cz.com

2012-07-14/20: Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK en Svitavy. Tutsemajna aranĝo kun la temo „Sciencfikcia literaturo kaj robotoj“ kaj ĝia turisma antaŭprogramo en Prago 2012-07-08/14. Info: www.kava-pech.cz/iek aŭ chrdle@kava-pech.cz

2012-07-27-08/12: Flugkaravano al Vjetnamio lige al la 97-a Universala kongreso de Esperanto en Hanojo. Info: www.kava-pech.cz/Vietnamio aŭ chrdle@kava-pech.cz

2012-09-13-16: La 6-a kongreso de AEH-IKEH (handikapitaj esperantistoj) en ripozdomo Štíří důl u Krucemburku (Skorpia valo ĉe Krucenburk. Info: aeh-ikeh@volny.cz

2012-09-27/30: Trilanda konferenco - Komuna konferenco de austraj, ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj. Info: www.esperanto.cz aŭ komitato@esperanto.cz

2013-julio: Flugkaravano al Islando lige al la 98-a Universala Kongreso de Esperanto. Antaŭintereson neniukaze sindevigan bv. sendi al chrdle@kava-pech.cz

Ĉu vi ne trovis vian aranĝon ĉi tie? Ne kulpigu nin, sed sendu la informon pri ĝi al miropiro2312@gmail.com (atentu la novan retadreson!). Ne eblas envicigi aranĝon, pri kiu ni ne scias.

Por resti daŭre informataj pri la Esperanto-aranĝoj bv. sekvi <http://www.esperanto.cz/cs/akce>

Atentu, ke la plej kompletan kalendaron de Esperanto-eventoj en la tuta mondo, sed ankaŭ plurajn utilajn informojn, vi trovos ĉe www.eventoj.hu

8. ADIAŬO kaj BONVENIGO de la NOVA REDAKTORO

Ĉi tio estas la lasta numero de ĈEA-retkomunikoj, kiujn preparis mi, la iniciatinto de la retkomunikoj kaj la unua redaktoro. Mi tenis la principon, ke retinformoj raportu precipe pri la estontaj okazaĵoj, ne pri tiuj, kiuj jam pasis, ĉar raportoj pri tiuj pli taŭgas por la presita organo de ĈEA Starto. Ununura escepto estis la rubriko „Ĉeĥa Esperanto-junularo aktivas“, ĉar male ol ĈEA, ĈEJ ne posedas sian oficialan organon kaj do laŭ la interkonsento kun la ĈEJ-komitato la ĈEA-retkomunikoj servis samtempe kiel oficiala organo de ĈEJ – kaj verŝajne tiel restos ankaŭ estonte.

Nun mi transdonas la redaktadon al Miroslav Hruška al kiu mi deziras bonajn kunlaborantojn kaj atentajn legantojn. Do ekde nun bv. direkti viajn kontribuojn, same kiel informojn pri eventualaj ŝanĝoj de via retadreso, al li: miropiro2312@gmail.com.